



Ĉapitro de libro de Carlo Minnaja – La Lingva Komitato iĝas la Akademio. La longa kaj pridiskutita vojo per kiu la Lingva Komitato transformiĝis en Akademion de Esperanto, de la jaro 1939 ĝis 1948. Unu el la plej gravaj partoj de nia movada historio. **p. 8**

# Nuba finjariĝo por UEA



La baloto por la nova Ĝenerala Sekretario kaj por du kromaj estraranoj kaŭzis novan krizon en UEA. Tantin-Ackermann eĉ postulis la demision de la nuna estraro. Ankaŭ Renato Corsetti esprimis dubojn pri la aldono de kromaj anoj. La lasta akto en ĉi tiu malfacila jaro. Ĉu la suno brilos por UEA en 2018? **p. 9**



## spegulo

La estonteco de Spegulo estas necerta. Mankas kunlaborantoj, sed ĝi estos daŭre malfermata al eksperimentado grafika kaj enhava. Ĉu Esperantujo bezonas avangardan voĉon sur la kampo de arto kaj kulturo? Speciala kajero

### INTERVJUO

## Konstruado de pli bona mondo...

... per Esperanto. Intervjuo al Fabrício Valle pri la ebleco plibonigi la mondon per sociala E-movado kaj pri la vojo por igi tion farebla. Antaŭrigardo pri du novaj projektoj: Instituto Teo Jung kaj la neregistara organizaĵo Sociala Lingvo. **pp. 4 kaj 5**



## Scienca Heroldo

### Progreso pri la kuraco de SMA

Spina Muskola Atrofio (SMA) estas grava genetika malsano, kiu kaŭzas degeneron de la muskoloj kaj gravan handikapon. Efika kuracmetodo ĝis nun ne ekzistas, sed la esploro progresas. Verkita de Christoph Klawe.

### Ĉu la Tero fariĝos neloĝebla fajrobulo ĝis la jaro 2600?

La homa ekspluatado transformos nian planedon en neloĝeblan fajroglobon antaŭ la jaro 2600, diris la fizikisto Stephen Hawking. Amri Wandel pri tio verkis por *Heroldo*.



Stephen Hawking

**p. 7**

### Survoje al jubileo de Heroldo

Reaperigo de artikolo de Teo Jung estas signo, ke *Heroldo* sin preparas por la jubilea jaro en 2020. **p. 2**

### TRA ESPERANTUJO

Debutas nova rubriko, kiu revas fariĝi dupaĝa **p. 6**



# Naciismo, esperantismo kaj kio okazis en Katalunio



**A. Fabián Jiménez**  
Instruisto pri historio



... laŭ la interna ideo de esperantismo, ekzistas alia koncepto de popolo

Por kerne kompreni la problemon en Katalunio, oni antaŭe devas kompreni kio estas popolo. Popolo ne estas lingva, kultura, historia, etna aŭ religia komunumo kiel ankoraŭ multaj opinias, rilatigante tion kun la koncepto de “nacio” aŭ “lando” kaj poste identigante tion kun “ŝtato”. Tiaj malnovaj ideoj apartenas al la 19-a jarcento kaj estas la kerno de la naciismo kiu kaŭzis la unuan mondmiliton kaj poste evoluis al faŝismo kaj al naziismo, kiuj provokis la duan mondmiliton. Fakte la interna ideo de Esperanto aperis por kontraŭbatali – kiel unua historia pacema movado por la unuigo de la nacioj, gentoj kaj homoj de ĉiuj landoj kaj kulturoj – naciismon. Do historie la esperantistaro batalis kontraŭ muroj kaj limoj intergentaj kaj oni povas vidi klare tiun ideon en la himno “La Espero”, kiam oni kantas: “Forte staras muroj de miljaroj, inter la popoloj dividitaj; sed dissaltos la obstinaj baroj, per la sankta amo disbatitaj.”

Do, laŭ la interna ideo de esperantismo, ekzistas alia koncepto de popolo, kiu tute ne rilatas al tiu de nacio, etno aŭ gento, kaj fakte estas nuntempe la bazo de la plimulto de la modernaj landoj aŭ ŝtatoj de nia tempo.

Fakte “popolo” ne plu estas “nacio” el samnacionoj, kiuj kunhavas la samajn etnan originon, religion, lingvon aŭ historion. “Popolo” estas “homa komunumo”, kiu libere volas vivi kaj decidi kune, alivorte “komuna decidvolo” de komunumo, kiu kutime ne estas samreligia, samlingva, samkulturdevena aŭ sametna, sed kiu deziras kunvivi kaj labori demokratie, laŭ komunaj normoj kaj leĝoj por atingi celojn. La plimulto de la modernaj socioj estas do diversaj, kaj tio riĉigas la homrilatojn, kvankam kelkfoje okazas ankaŭ problemoj kaj konfliktoj diverskaŭze inter grupoj apartenantaj al la sama socio, kiujn necesas superi demokratie kaj laŭleĝe.

La popolo havas suverenecon, nome decidkapablo, kaj nur ĝi, per siaj reprezentantoj, povas proponi demokratie la leĝojn, kiuj estas validaj por ĉiuj. Nenia minoritato rajtas leĝdoni pri afero, kiu rilatas al la tuta popolo, ĉar nenia minorita-

to havas suverenecon, nur la tuta popolo havas decidkapablon, kaj kompreneble neniu rajtas perforti la leĝon. Se tio lasta okazas, la registaro rajtas uzi la forton per polico kaj poste la juĝistoj juĝos kaj punos laŭleĝe. Tiel funkcias demokratio kaj la jura ŝtato, kiuj kutime skribas la plej gravajn leĝojn en la konstitucio, kiu estas la plej grava kaj fundamenta leĝfonto.

Okazas ofte, ke en tiuj socioj, kie kunvivas minoritatoj, fojfoje ili estas plimulto en iu geografia regiono aŭ konkreta teritorio kaj estas inde — por bona administracio kaj respekto al ili — plenumi kelkajn petojn kaj favore aŭskulti plendojn de tiuj minoritatoj, kadre de federalismo, alivorte doni al la loĝantaro de diversaj regionoj aŭtonomion por memdecidi pri diversaj aferoj kiel edukistemo, sansistemo, regionpolico, veturtrafiko, naturmedio, turismo ktp. Tiel la ŝtato disdonas erojn el sia popoldevena povo al la loĝantaro de la diversaj regionoj, kiuj havas ankaŭ sian propran parlamenton kaj decidkapablon pri ĉiuj aferoj, kiuj estas ceditaj al ili de la tuta popolo. Sed oni neniam devas forgesi, ke tio ne signifas disdoni la suverenecon, alidire, la plenan decidpovon, kiu ĉiam restos afero de la tuta popolo, de la ĝecivitanoj de la tuta lando, kaj neniam nur de la loĝantaro de aparta teritorio aŭ regiono.

Klariginte tiajn kernajn konceptojn ni reveno al la problemo en Hispanio kaj al la klopodo de la katalunaj naciistoj atingi la sendependiĝon. Hispanio estas lando plendemokratia ekde 1978, aliĝinta al UN kaj kiu, post favora voĉdono de 180 el la 193 membroj de UN, partoprenos en la Konsilio de Homrajtoj. Hispanio estas ankaŭ membra lando de Eŭropa Unio, kies membraro devas doni ĉiujn internaciajn demokratiajn garantiojn. Do oni neniel povas dubi pri la demokratieco kaj la respekto de homrajtoj en Hispanio.

La hispana popolo estas diverskultura kaj diverslingva kaj, por respekti kaj plenumi tiun diversecon, la lando organiziĝis federacie per dek sep aŭtonomaj regionoj, kiuj havas vastan decidkapablon pri plej diversaj aferoj, kaj fakte ĉefe pri la edukadistemo kaj la sansistemo, eble la plej

gravaj kampoj de la publika povo. La hispanaj aŭtonomaj komunumoj havas pli da aŭtonomio ol ekzemple Skotlando flanke de Britio.

Aparta ĉapitro estas la situacio de la kataluna lingvo, pri kiu oni plendas esti vundita kaj persekutita, dum ĝi estas la sola lingvo de la kataluna edukadistemo. Fakte la katalunaj ĝelernantoj studas nur du aŭ tri horojn semajne la hispanan kaj tio estas multe malpli ol ili studas la anglan. Oni lernas matematikon, sciencojn, historion, filozofion, ĉion nur katalune. Ĉiuj administracioj uzas la katalunan; scii ĝin estas devige por esti doktoro, instruisto aŭ laboranto en ĉia publika laborposteno. Estas kontraŭleĝe skribi la nomojn de restoracioj, butikoj aŭ kompanioj en alia lingvo, se ili ne aperas ankaŭ katalune. Ankaŭ la restoraciaj menuoj kaj ĉio ene de butikoj devas esti en la kataluna. Kaj kompreneble ekzistas katalunaj televidaj kaj radiaj kanaloj, kiuj elsendas ne nur en Katalunio, sed al la tuta mondo per interreto.

La naciistoj diris, ke ekzistas ne hispana popolo, sed kataluna popolo, kaj laŭ ili tiu popolo havas suverenecon, alivorte decidkapablon pri sia estonteco kaj sia sendependiĝo. Ili rajtas defendi ian ideon, sed ili ne faris tion laŭleĝe, ĉar ili scias, ke eĉ en Katalunio almenaŭ duono de la loĝantaro estas kontraŭ la sendependiĝo. Do ili preferis agi kontraŭkonstitucie, perforti la leĝon kaj organizi kontraŭleĝan referendumon tute sengarantian, kie estis eble voĉdoni plurfoje. Senhezite ili antaŭeniris kaj deklaris sendependan katalunan respublikon, perfortante ĉiujn hispanajn kaj katalunajn leĝojn.

Nuntempe pli kaj pli da homoj samideas kun tiuj estintaj esperantistoj, kiuj batalis kontraŭ la fortaj muroj de miljaroj inter la popoloj kaj ege laboris per Esperanto por faligi tiujn murojn. Tamen hodiaŭ estas mirinde, kiel multe da esperantistoj apogas la naciismajn movadojn, la sendependiĝon kaj kreadon de novaj muroj, kiuj antaŭe ne ekzistis (je la nomo de ia ideo pri miskomprenita demokratio) aŭ ian rajton pri sendependiĝo, kiun UN akceptas nur okaze de kolonioj aŭ militsituacio, kio tute ne okazas en Katalunio. La mondo ja fariĝis stranga kaj freneza.

## INTERNACIA LABORLINGVO La praktika aplikado de Esperanto tra la mondo

### Esperanto-landologio

Daŭrige al la prezento de la E-movadidoj, laŭ la strategio de Sociala Lingvo por sisteme disvolvi la praktikan utiligadon de Esperanto, ni prezentos al niaj legantoj kio estas E-landologio. Ĉi tiu faka kampo estas unu el la plej gravaj kaj ni povas aserti, ke Esperanto-landologio estos vojo al granda interkompreniĝo inter la popoloj, ĉar tiu E-movadido stimulas la ĝisfundan studadon pri ĉiuj landoj.

Nu, E-landologio konsistas el sistema esplorado de ĉiuj aspektoj de la landoj: historiaj, ekonomiaj, geografiaj, politikaj, kulturaj ktp. Do, ekzemple, brazilologio estas la sistema esplorado kaj studado de ĉiuj aspektoj pri Brazilo. Kiujn intereso E-landologio? Fakuloj pri internaciaj rilatoj, politikologoj, sociologoj, historiistoj kaj amatoraj E-landologiistoj.

Ni, en Esperantujo, parolas multe pri amikeco inter la nacioj, amikeco trans limoj, sed la amikeco estos multe pli granda se ni scios funde la landojn de niaj eksterlandaj samideanoj. La intereso povos esti tre diversaj kaj ne nur surbaze de la potenco de la landoj. Ni esperantistoj devas lerni, ke ĉiuj

landoj gravas. Trovi materialon pri iu granda lando, laŭ la ekonomia kaj politika vidpunktoj, en la angla, franca, hispana lingvoj estas ne tre malfacile, sed trovi riĉan materialon pri Bolivio, Angolo, Slovenio kaj multe da aliaj, kiuj ne estas grandaj potencoj, ne facilas. Do, E-landologio povas ŝtopi truon, se en ĉiu lando, kie troviĝas esperantistoj, estos fondita ĉefmotora pensfabrika NRO pri la koncerna lando.

#### Pensorganizaĵoj

Ĉu vi scias, kio estas pensorganizaĵo (aŭ pensfabriko, laŭ Vikipedio)?

Pensorganizaĵo estas bone strukturita asocio de sociosciencistoj (sed ne nur de tiuj), kiuj kune elpensas novajn konceptojn kaj strategiojn pri la plej diversaj mondaj aferoj. Ĉu ni havas pensorganizaĵojn en Esperantujo? Ĉu UEA estas pensorganizaĵo? Laŭ kelkaj aspektoj, eble jes, sed entute ne. Se ni volas vere allogi fakulojn pri politiko, ekonomio, historio de specifaj landoj, internaciaj rilatoj kaj similaj temoj, ni devas havi niajn E-pensorganizaĵojn.

Ĉu estas bona ideo, ke ĉiu

landa asocio de UEA transformiĝus en pensorganizaĵojn pri sia lando? Ĉu ekzemple Argentina Esperanto-Asocio fariĝus pensorganizaĵo pri Argentino, kun la celo produkti “abundan materialon” pri tiu grava sudamerika lando? Imagu ĉion ĉi en Esperanto pri Argentino: libroj, kursoj, eventoj, revuo, videoj, prelegoj, tezoj. Ĉu ne estus utila materialo por E-landologoj interesitaj pri Argentino?

#### La inkubatoro de Sociala Lingvo

La fondota NRO Sociala Lingvo (reklamo ĉi-numera, p. 11) certe grave rolos en la kovado de novaj pensorganizaĵoj. Sub la signo de Sociala Lingvo naskiĝas tute nova strategio por eduka, kultura, ekonomia, scienca kaj social-asista agado per Esperanto. La inkubatoro de Sociala Lingvo funkcios surbaze de sociala teknologio kaj certe estos granda partnero de ĉiuj aktivuloj kies celo estos transformi la mondon. Lerni Esperanton kaj ŝanĝi la mondon, jen nia propono por akceli la diskonigadon de Esperanto de unu flanko, kaj vikle disvolvi la praktikan uzon de nia lingvo.

### Universala Medicina Esperanto-Asocio

La Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) estas faka Esperanto-asocio pri medicino, fondita en 1908. Ĝi estas faka asocio de UEA; fakte, unu el la plej aktivaj. Ĝia prezidanto estas Christoph Klawe (Germanio). Legu lian artikolon ĉi-numere en Scienca Heroldo, p. 7. El Vikipedio ni reaperigas sube kelkajn informojn pri UMEA.

#### Historio

La Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio (TEKA) fondiĝis en 1908 dum la 4-a Universala Kongreso, en Dreseno, sekve de alvoko de Wilhelm Róbin en *Voĉo de Kuracistoj*. Poste nomita Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA), ĝia unua adresaro kun plena nomaro enhavis 19 landajn konsulojn, 41 urbajn reprezentantojn kaj 428 anojn.

Organoj de la asocio estis *Internacia Medicina Revuo*, kiu publikiĝis en la

1920-aj kaj 1930-aj jaroj, post la Dua Mondmilito sekvis *Medicina Revuo* (1951-1963) kaj dufoje jare *Medicina Internacia Revuo* (ekde 1964). El tio, de 1964 al 1977 la revuo redaktiĝis en Tiba (Japanio), poste ĝi kompiliĝis en Krakovo (Pollando). Ekde la 21-a jarcento la revuo aperas ankaŭ en reta eldono. En junio 2013 celebriĝis la 100-a eldono. Inter 1987 kaj 1990 UMEA krome eldonis la revuon *Medicina Kuriero*, kiu aperis en Sofio – neregule la kuriero plu aperas ĝis nun.

#### Internaciaj Konferencoj

Ekde la jaro 1977 la asocio ĉiun duan jaron okazigas internaciajn medicinistajn Esperanto-konferencojn (IMEK). La unua disvolviĝis en Krakovo, sekvis pluraj tra la jaroj kaj la 20-a IMEK okazis en Nitro, Slovakio, en 2017.

UMEA certe estos regula protagonisto en ĉi tiu rubriko, rilate al aplikado de Esperanto.

## INTERVJUO

## FABRÍCIO VALLE

# Plej gravas nun fari el Esperanto lingvan protagoniston en la konstruado de pli bona mondo

Fabrizio Valle eklernis Esperanton ankoraŭ juna, 17-jaraĝa, kaj ĉiam vigle partoprenis la brazilan E-movadon. De BEJO, la junulara sekcio de TEJO en Brazilo, li estis kasisto kaj prezidanto. De BEL (landa sekcio de UEA) li estis direktoro de instruado, prezidanto de ĝia federacia konsilantaro, kaj kiel oficisto laboris en la BEL-libroservo kaj fariĝis ĉefredaktoro de la revuo *Brazila Esperantisto*.

En 1987 li fondis kun Paulo Lima – tiu sama kiu kun li fondis la E-entreprenon Sociala

Grupo Lexus en 2016 kaj mortis en januaro ĉi-jare – la eldonejon Zamenhof Editores, kiu eldonis librojn kaj en la portugala kaj en Esperanto. En la portugala elstaras *Direito Penal kaj Direito de Execução Penal*, de iu konata juristo en lia ŝtato, Licínio Barbosa, kies kovrilo estis farita de internacia konata pentristo, Siron Franco. Li eldonis inter aliaj libroj la unuan de Gbeglo Koffi (*Mi vizitis grandan urbon*), la portugallingvan version de la *Zagreba Metodo*, la bildstria revuon

*Logo*, libreton pri prepozicioj en Esperanto kaj *Maŝinmondo-n*, de Sándor Szatmáry, en la portugala, tradukitan de Leopoldo Knoedt. Aperis recenzo pri tiu libro en la fama ĵurnalo *O Estado de São Paulo*. La gazeto *Brazila Heroldo* estis fondita kaj eldonita de li dum 2 jaroj. Lastatempe li fariĝis konata internacie pro tio, ke dum 2,5 jaroj li redaktis la revuon *Esperanto*, de UEA, kaj nun estas la posedanto de *Heroldo de Esperanto*, kvankam ĝia proprieto estas disputata kun LF-koop.

## Antonio Codazzi

f\_sophia@libero.it

**Vi estas konata kiel agema esperantisto kiu delonge aktivas en Brazilo. Do ĉu vi povas nun paroli pri vi laŭ “pli vasta” vidpunkto?**

Mi estas radikala idealisto, foje tre naiva kaj impulsema. Mi lernis filozofion kaj fizikon en la universitato kaj fine ne diplomigis kaj deĵoris de mia vera alvokiĝo, universitata kariero, por sin dediĉi al E-entreprenado. Pluraj el miaj kolegoj el la tempo de la universitataj studoj estas hodiaŭ profesoroj.

Se paroli pri mia ĉefa agado en Esperantujo, mi eldonis librojn kaj ankaŭ la gazeton *Brazila Heroldo* (12 numeroj), pri Brazilo. En tiu tempo ne estis interreto kaj mi vojaĝis tra la lando por vendi miajn librojn en librovendejoj. Ne estis facilaj tempoj, sed la eldonejo sukcesis supervivi de 1987 al 1995. Se paroli ekzakte pri tio, kio mi estas: mi estas vaganta metamorfozo. Heraklito donas al mi la devizon de mia vivo: ĉio fluas. Inter la nemulte konataj filozofoj, elstaras unu, kiun mi treege ŝatas: via samlandano Pietro Ubaldo.

**Tamen, Fabrizio Valle estas ankaŭ pridiskutita persono, kaj en 2013 kiel redaktoro de la UEA-revuo Esperanto kaj hodiaŭ kiel nova posedanto de Heroldo de Esperanto, ĉefe pro la kverelo kun LF-koop, la antaŭa proprieto. Ĉu eble en via vivo ĉeestas iom de Heraklito (“ĉio fluas, ĉio transformiĝas”) kaj iom de Oscar Wilde (“ne gravas ke oni malbone parolas pri io, sed gravas ke oni parolu pri tio”)?**

Unu afero estas labori kiel redaktoro de Esperanto, tute alia esti la posedanto de Heroldo. Rilate la organon de UEA, mi lernis, ke UEA ne havas klarajn redakciajn direktivojn sed mi estis plene libera fari mian laboron, kiun mi klopodis plenumi laŭ miaj kapabloj. Multaj kritikis la rezulton, eĉ antaŭ la apero de mia unua numero (!), kaj tio montras ian antaŭjuĝemon. Aliaj ŝatis la rezulton kaj tio pruvas, ke ne eblas kontentigi ĉiujn. La estraro de UEA neniam, dum mi estis reda-

ktoro, sciigis, ke ĝi estas malkontenta kaj ke mi devus ŝanĝi “tion kaj ĉi tion”, escepte de kritikoj tre specifaj neniel rilataj al la direkto de la laboro. Rilate Heroldo-n, temas pri 100% sendependa gazeto, sen listo de proskribitaj kunlaborantoj, kiuj tamen devas sekvi kelkajn direktivojn. Heroldo neniam estos areno por sterilaj kvereloj, por personaj atakoj, por akuzoj sen pruvoj. Kritika enhavo bonvenas, sed kun solidaj fundamentoj. Resume: temas pri serioza kaj sincera klopodo disponigi al la esperantistoj altnivelan gazeton, kongruan kun la nuntempa mondo kaj kun la cirkonstancoj en Esperantujo.

Se paroli pri LF-koop, estas neniu kverelo, sed skandala trompo flanke de la gvidantoj de LF-koop, kaj mi simple defendas kaj plu defendos miajn rajtojn. Aliflanke, mi apenaŭ kredas, ke konataj esperantistoj, tre aktivaj sur la kampo de literaturo ktp, estis kapablaj false agi en internacia transakcio. Mi bedaŭros, ke, se tiu disputo ne estos solvita laŭ tute justa maniero, la historio de LF-koop kaj de ĝiaj gvidantoj kaj membroj estos por ĉiam makulita. Ili povas manipuli la informojn en HeKo, la novaĝaĝentejo de la Esperanta Civito, sed ne sukcesos malpermesi, ke la vero estu vaste konata ekster la limoj de la Esperanta Civito.

Nu, pri aforismoj kaj famaj frazoj, por ĉiu momento ni povas elekti unu. Erasmo el Roterdamo, ekzemple, diris ke “estas multe pli honeste sin prezenti nuda ol uzi travideblajn vestojn.”

**Anstataŭ pri la Esperanta Civito, parolu ni pri Esperanta civilizo. Vi multe agis dum multaj jaroj por puŝi la movadon kaj Esperantujojn, ne nur en via lando. Kion vi deziras lasi al nia internacia komunumo kiel heredaĵon?**

Mi bezonas vivi pliajn 30 jarojn por konkretigi ĉiujn miajn planojn, kaj la du ĉefaj heredaĵoj kiujn mi esperas lasi estas unue tute nova aranĝo ĉirkaŭ Heroldo de Esperanto; alidire, mi volas ĉefmotore agi por fondo de Instituto Teo Jung (ITJ), neregistara organizaĵo kiu heredos Heroldo-n, ne malbaldaŭ.



**Mi bezonas vivi pliajn 30 jarojn por konkretigi ĉiujn miajn planojn**

Esence, temas pri tio, ke post mi Heroldo estos posedaĵo de neniuj entreprenoj aŭ organizaĵoj, sed de la abonantoj, kiuj propravole aliĝos senpage al ITJ, se interese ilin influu en la vivo de Heroldo. ITJ ne nur mastrumos kaj eldonos Heroldo-n, sed havos du aŭ tri aliajn celojn, ligitajn al ĵurnalismo. En Lisbono ni donos la unuan konkretan paŝon tiucele kaj en la venontaj numeroj de Heroldo ni stimulos niajn abonantojn partopreni la preparlaborojn por ĝin fondi.

Sed mia plej granda kontribuo estos la fondo kaj la evoluigo de nova internacia neregistara organizaĵo, nome Sociala Lingvo, kune kun aliaj samideanoj, kiuj pretas intense sin dediĉi al strategio por evoluigi la socialan, kulturan, edukan kaj sciencan agadon per Esperanto. Ekster Esperantujo la mondo bolas, infanoj mortas pro malsato, senlaboreco skuas familiojn, militoj estas flegataj de potenculoj ligitaj al la armilindustrio, la grandaj potencoj akaparos la riĉaĵojn de la malfortaj landoj kaj sponsoras puĉojn, orfanoj vagas tute senhelpaj sur la vojoj de grandaj urboj en multaj landoj, mankas lernejoj en pluraj malriĉaj landoj, la homaj rajtoj estas malrespektataj... Resume, ni vivas en maljusta mondo kaj estas necesa monda koalicio de NRO-j, kooperativoj kaj socialaj entreprenoj por kunlabori kaj kune solvi plurajn problemojn de la mondo. Nu, tiu koalicio bezonas komunan lingvon kiel Esperanton kaj ni havas tre klaran strategion por fari el tiu koalicio konkretan Esperantan forton en la mondo.

Mi iomete jam verkis pri tio

en la du lastaj numeroj de la revuo Esperanto, redaktitaj de mi, kaj plu verkas pri tiu projekto en Heroldo mem. Mi invitas ĉiujn esperantistojn, kiujn interesas konkrete agadi por plibonigo de la mondo uzante Esperanton kiel laborlingvon, fariĝi kunfondintoj de Sociala Lingvo kaj kunlasi tiun heredaĵon al la mondo. Mi sola kapablos fari nenion.

**Ni ĉiuj bondeziras al vi longan vivon por plenumi tiujn laŭdindajn taskojn. Vi klarigis la celon de tiuj organizoj (Teo Jung kaj Sociala Lingvo), sed ne iliajn radikojn. Kio naskigis ilin? Kaj ĉu ververe ni bezonas kromajn organizaĵojn kaj institutojn, anstataŭ plibonigi la nunajn?**

Mi dankas vin pro la provoka demando. Nu, unue bonvolu kompreni, ke mi ne parolas pri novaj E-asocioj, sed pri neregistaraj organizaĵoj, kiuj adoptos Esperanton kiel laborlingvon. Tiu simpla nuanco alportas revolucion, kiun mi povas facile klarigi: la E-movadaj asocioj naskiĝis por fundamenti diskonigi kaj instrui Esperanton sen ligo kun iu konkreta apliko. La celo estis fari el Esperanto vivan lingvon kaj tion la E-movado brile sukcesis... Sed bedaŭrinde la movado plu restas alroĉita al tiu historia misio, sen kompreno, ke nun ni havas plurajn novajn misiojn, nome evoluigi la praktikan uzon de Esperanto, ĉu profit-ĉu neprofitcele. La strukturo, la labor-kaj pensmaniero de la E-movadaj instancoj ne estas preparitaj por tiuj pluraj novaj misioj, ĉar ili estis kreitaj por esence nur diskonigi kaj instrui Esperanton per nur volontula laboro. Fakaj asocioj estas maloftaj kaj inter la maloftaj tre malmultaj bone funkcias. Pro tio mi parolas en miaj artikoloj pri E-movadidoj, ĉar paroli pri ili estas paroli pri divido de la farenda laboro inter nur fakaj (ĉefmotoraj) asocioj. Mia sperto en la brazila movado montris al mi, ke tiuj ideoj estas konsiderataj frenezaĵoj de viziulo kaj, pro tio, ke la esperantistoj esta pli-malpli la samaj en la tuta mondo, mi kredas ke la gvidantoj de la nunaj E-movadaj asocioj tra Esperantujo ne volas

plibonigi radikale siajn asociojn per tute novaj ideoj. Ili volas nur ĉesigi la ŝrumpadon de sia membraro, per la samaj ideoj, celoj, strategioj, labormanieroj uzataj ekde 1887. Kaj diskonigi kaj instrui Esperanton, laŭ pozitivisma sinteno.

Mi plu klarigas: nuntempe ne plu havas sencon paroli pri internaciaj, landaj, lokaj kaj fakaj asocioj. Tio estis valida skemo de 1887 al la alveno de la teknologio de informado kaj komunikado kaj de la tutmondiĝo. Nun ĉiuj povas kaj devas roli internacie; do ĉiuj asocioj estu internaciaj. Krome, la diferenco inter ĉiuj asocioj ne plu povas esti ilia hierarkia pozicio en piramida strukturo – iuj asocioj en la supro de la piramido (internaciaj organizaĵoj), iuj en la mezo (landa nivelo) kaj la cetero en la bazo de la piramido (la lokaj asocioj). Tio, kion Sociala Lingvo proponas, estas nur duspekcaj asocioj: internaciaj ĉefmotoraj kaj lok-motoraj asocioj en horizontala malfermita kaj rol-distribua reto. Ĉiu asocio en sia niĉo kaj la ĉefmotoraj havos la mision kerne agi en iu laborkampo de iu E-movadido. La lok-motoraj asocioj, kun malpli kompleksa strukturo, ligiĝos al unu, du aŭ pluraj ĉefmotoroj. La radikoj de tio kuŝas esence en la neceso forlasi la jam plenumitan mision, nome vivantigon de lingvoprojekto kiu jam estas viva lingvo, por intense investi niajn fortojn en la novaj misioj kiuj venas per la nova historia ondo en la vivo de Esperanto kaj estas ligitaj al ĝia praktika utiligo. La intervjuo de mia brazila samideano Luiz Signates, kiu aperos en la 6-a numero de Heroldo de Esperanto, jarkolekto 2017, tre klare kaj brile prezentas tiun neceson. Li tamen ne prezentis la konkretan manieron adopti novan sintenon rilate la rolon de Esperanto en la mondo, sed la fondita NRO Sociala Lingvo naskos tiun manieron agi, en mutuala monda reto de NRO-j, kooperativoj kaj socialaj entreprenoj.

Kio naskigis ilin? La forto de la historio! Se mi ne eraras, estis la franca verkisto Victor Hugo tiu kiu diris, ke “nenio estas tiom pova kiom ideo, kies tempo estas alveninta.” La tempo de ideo pri internacia neŭtrala laborlingvo alvenis, sed



# TRA ESPERANTUJO

Loka agado ★ Fakaj iniciatoj ★ E-protagonistoj ★ Novigaj iniciatoj ★ Eventoj ★ Efemeridoj ★ Plukitaj frazoj

## ENTREPRENO: BONVENO EN GERMANIO

Petro Zilvar kaj Zsafia Korody diskonigis interesan ideon: en la grandurbo Göttingen, grandaj germanaj sociaj entreprenoj (NRO-j, vere) kiel Caritas, AWO, Diakonie, Germana Ruĝa Kruco/DRK fondis la firmaon "Bonveno". Ĉie ili skribis, ke ili tute konscie (tio eĉ

estas programo) elektis la vorton el la internacia lingvo Esperanto. Jen senfina laborkampoj por la esperantistoj, se oni decidis paŝi antaŭen kaj forlasi la "antikvan reĝimon", bazitan sur nur diskonigado kaj instruado de Esperanto.



## ESPERANTO-MUZEO EN VIENO: KOLEKTOJ KAJ KOLEKTOJ

La viena E-muzeo kaj Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko havas novajn retejojn: Esperantomuzeo, ĉe <http://www.onb.ac.at/eo/museen/esperantomuzeo/> kaj plurajn aliajn, kiuj temas pri kolekto por planlingvoj, libroj, periodaĵoj, Universalaj Kongresoj de Esperanto (1905-1939), unua mondmilito kaj scienca blogo. Ne pre vizitindaj. Ili devus esti devige prezentataj en bazaj kursoj de Esperanto, ĉar lerni akuzativon ne sufiĉas. Bernhard Tuidier, la teamgvidanto de la muzeo, tre dankos. Kaj ankaŭ ni!

## UNIVERSITATO DE PARMA: PREMIO GIORGIO CANUTO

En la 19-a de oktobro 2017 Carlo Minnaja diskonigis, ke "hodiaŭ matene (jam la okan fojon) estis atribuita, ĉe la universitato de Parma, la ĉiujara premio *Giorgio Canuto* (iama rektoro de tiu universitato kaj prezidinto de UEA), pri la plej bona findiploma disertacio pri Interlingvistiko kaj Esperantologio." La premion gajnis Maria Elena Ramelli per la disertacio *Jules Verne esperantista?* (Ĉu Jules Verne [estis] esperantisto?). Inicatas la universitato, mastras profesoro Davide Astori kaj la E-grupo de Parma, al kiuj ni elkore dankas. Cetere, Antonio De Salvo informas, ke "pri la rilatoj inter Jules Verne kaj Esperanto oni povas legi artikolon en mia blogo: <http://www.bitoteko.it/esperanto-vivo/eo/2017/03/24/jules-verne/>." Nu, kion atendi? Ĉiuj bonvolu iri rapide al la blogo de Antonio De Salvo.

## #TEJOAKADEMIO: KIEL KREI NOVAN LOKAN GRUPON

TEJO sendube fariĝas la avangardo de la Esperanto-movado pri siaj lastatempaj iniciatoj. Nun ĝi proponas helpon al tiuj, kiuj volas krei novan lokan grupon per reta trejnado. En la retejo <http://akademio.tejo.org/kursoj/loka-grupo/> estas diversaj infomoj kaj instrukcioj por tiuj, kiuj volas fondi novan grupon en sia urbo. Pluraj demandoj gvidas la fondontojn de grupo por orientiĝi pri la celoj. Oni proponas taskojn kaj vere abundas utilaj informoj. Gratulegon al la gejunuloj de TEJO. Bele ĵetpafita golo.



## PROTAGONISMO: MERITITA PREMIO

Itala Esperanto-Federacio ricevis la premion "Itala premio pro homaj rajtoj 2017" fare de asocio de liberaj ĵurnalistoj kaj de la itala sekcio de Amnesty International. La premio konsistanta el diplomo kaj pentraĵo estis transdonita al la prezidantino de IEF, Michela Lipari, dum ceremonio en Romo. La motivigo de la premio parolas pri la agado de IEF en la kampoj de interkompreno inter popoloj laŭ la idealoj de Esperanto, de helpo al viktimoj de militoj kaj katastrofoj en la mondo, de partopreno en la agado Oriento-Okcidento de Unesko, laŭ informis Renato Corsetti per sociaj retoj kaj nenombreblaj diskutlistoj en kiuj li partoprenas. *Heroldo de Esperanto* aparte ĝojas kaj gratulas, ĉefe pro tio, ke la italoj fariĝis lastatempe la baza fundamento de la evoluo de *Heroldo*. Cetere, Italio estos la platformo por la agado de Fabricio Valle dum la 3-monata restado en Eŭropo, dum kiu la redakcia direktoro de *Heroldo* povos koni persone ĉiujn italojn el la Esperantuja mondo.

100% MERITITA PREMIO



## UNESKO: RAKOEN MAERTENS

Parolis nome de UEA en la 39-a Ĝenerala Konferenco de UNESKO Rakoena Maertens, en la 6-a de novembro 2017. Tute sen komentoj, nur la parolado de la reprezentanto de UEA, por historia registriĝo en la papera versio de *Heroldo*:



"Viaj prezidantaj moŝtoj de la Ĝenerala Konferenco, via Ĝenerala Sekretaria moŝto, viaj delegitaj moŝtoj kaj aliaj ĉeestantoj, komunikado, jen la kialo de nia ĉeesto. Ni estas ĉi tie por trovi komunajn interesojn. Ni estas ĉi tie por kreskigi interkomprenon inter ni ĉiuj. Ni ĉiuj volas estigi partnerecojn ĉirkaŭ niaj valoroj, niaj kredoj kaj niaj komunaj vidpunktoj. Cetere, komunikado ne ĉiam estas tio, kio ĝi ŝajnas esti: ekzistas baroj. Unu el tiuj baroj povas esti lingvo. Diferencoj en lingvonivelo kaj lingvaj spertoj depende de kie ni kreskis. La interpretado de simboloj kaj gestoj ligitaj al specifa kulturo, en malegaleco de memesprimado, ĉar kelkaj lingvoj ne estas vaste agnoskataj, dum aliaj estas. Per uzo de specifa lingvo ligita al specifa kulturo kreiĝas komunika antaŭjuĝo. Universala Esperanto-Asocio klopodas kontraŭbatali tion kune kun pli ol 100 landaj Esperanto-asocioj kaj pli ol 60 alligitaj fakaj asocioj. Nia asocio defendas bonan komunikadon, egalecon inter lingvoj kaj kulturoj, lingvan diversecon kaj kulturajn interŝanĝojn. Fondita en 1908, nia asocio havas longan historion pri defendo de tiuj valoroj. Jam de pli ol 60 jaroj nia asocio estas alligita al UN kaj UNESKO en konsulta statuso. Dum Ĝeneralaj Konferencoj de UNESKO en Montevideo, en 1954, kaj en Sofio, en 1985, niaj laboroj kaj atingoj estis oficiale agnoskitaj kiel kontribuoj por interkompreno inter la popoloj de la mondo. La fonto de la internacia lingvo Esperanto estas la neceso de internacia komunikado per egaleca lingvo, facile lernebla kaj sen ligo al ajna politika potenco. Ĉi-jare, ni kune kun UNESKO celebras la centjarigon de la forpaso de la humanisto kiu kreis Esperanton, Ludoviko Zamenhof. Ni sincere dankas UNESKO-n kaj la polan delegitaron pro ilia helpo en la realigo de tiu ĉi celebrado, kaj invitas vin ĉiujn al nia evento en la 11-a de decembro en tiu ĉi konstruaĵo. Kun ĝojo ni ankaŭ anoncas, ke ekde tiu ĉi jaro la ĵus relanĉita UNESKO-kuriero havas Esperantan version. Komunikado. Mi komencis mian parolon emfazante la gravecon de bona komunikado. Por fini, mi deziras al vi profundan, signifoplenan kaj fruktodonan dialogon surbaze de malfermece kaj komprenemo. Dankon!" Sen komentoj, tamen ne sen gratuloj, ĉar, vole-nevole, temas pri grava atingo de UEA. Do, gratulon, UEA. Ni ŝatas vin, kedu!

# Tra Esperantujo

- Loka agado ● Fakaj iniciatoj
- E-protagonistoj ● Novigaj iniciatoj
- Eventoj ● Efemeridoj ● Plukitaj frazoj

La rubriko, kiun ni anoncis en la pasinta numero, aperas kun iom modifita nomo: *Tra Esperantujo*. Ĝi enhavas mallongajn (foje ne tre mallongajn) notojn kun informoj pri gravaj okazintaĵoj tra la tuta Esperantujo. Eble ja gravaj, foje plej gravaj en sia kampo, sed *Heroldo* ne pretendas dikti tion, kio estas plej grava okazintaĵo. Verdire, ni planas plej diverse informi pri menciindaĵoj eble laŭ la plej ampleksa aliro pritema kaj priregiona.

La redaktoro de tiu ĉi rubriko ekde la venonta numero estos Massimo Ripani. Kontakto lin: [massimo.ripani@heroldodeesperanto.com](mailto:massimo.ripani@heroldodeesperanto.com)





Heroldo

# spegulo

ARTO KAJ KULTURO

*inter etaj kaj grandaj  
kulturoj,  
sendanĝere senĝenaj,  
senmalicaj,  
la poetoj esperantaj –  
inkognite marĝenaj,  
vojrandaĵaj,  
intersticiaj...*

Jorge Camacho, El Brulvunde (2017)

Kajero de arto kaj kulturo de Heroldo de Esperanto • N-ro 2 (2) 1-a jarkolekto • Eldonata en Trindado - GO (Brazilo) kaj distribuata kune kun HdE

[www.heroldodeesperanto.com](http://www.heroldodeesperanto.com)

# ENUO

## Foto-rakonto de Lima Cipolatti

Eksperimenta foto-rakonto miksanta antikvan eldonaĵon lanĉitan en Brazilo en la 1960-aj jaroj kaj iom de la aktualaj bildstrioj. Spegulo malfermas siajn paĝojn al ĉiuspecaj eksperimentoj, ĉu tekstaj, ĉu grafikaj, ĉu kombinaĵo de teksto kaj grafikaĵoj.



### Teknikaj informoj pri la originala publikaĵo

**Portugala teksto, fotoj kaj direktado:**

Lima Cipolatti

Roluloj:

**Kuracisto:** Vitor Menezes

**Kliento:** Álvaro Fausto

**Enpaĝigo kaj fina artaĵo de la papera versio:**

Vitor Menezes

**Kunproduktis:**

Kultura Kooperativo de Esperantistoj

Brazila Esperanto-Ligo

### Teknikaj informoj pri la adapto por Spegulo

**Ciferigo de la originalaj bildoj kaj grafika aranĝo:** Eric Kaji

**Elektado de la ilustraĵoj kaj adapto el la originala strukturo:** Fabrício Valle

# ENUO | Foto-rakonto de Lima Cipo

Ĉu Esperantujo bezonas avangardan voĉon sur la kampo de arto kaj kulturo? Ĉu ni, esperantistoj, estas avangardo kapabla krei ne nur originale valoran literaturon, sed ja avangardan literaturon, kiu ne estu kopio de la naciaj literaturoj? Ĉu ni kapablos avangarde agi ade per tute novigaj eksperimentoj sur la kampo de la arto en ĝia plej ampleksa senco?

Spegulo taŭgas por tio, se ĝi ne taŭgas por la formala literaturo de la satantoj pri novaj ideoj: sentima eksperimentumo!

Spegulo estas kajero de preskaŭ 100-jara gazeto kaj devus agi kiel konservativa kajero de arto kaj kulturo, kun kontribuoj de la plej gravaj moŝtoj el Esperantuja Akademio de Beletro, sed ĝi, kiel filo tute nove naskita de veterana gazeto kaj kiu eble tro kuraĝas en sia renovigemo, pretas petoli tute senrespondece, kvazaŭ ribela filo. La nomo *Spegulo* estas ligita al iam ekzistanta gazeto, sed nun mortinta, de poloj kiuj siavice pretis inventi la novon. Nun Spegulo respegulas la tutan mondon, tre malcentrisme, ĉar Esperantujo ne povas esti piramido kun pinta regiono kie loĝas nur la dioj lojalaj al Atena.

Jes ja, *Spegulo* estas loĝejo de ĉiuj dioj, ankaŭ nigrolaj, indianaj, aztekaj, tupiaj. Ankaŭ la diojn de Barato kaj Ĉinio kaj Japanio kaj Filipinoj kaj Indonezio ni invitas por kune kun Atena inspiri nin. **Mi forveturos al Pasargado\*** Tie mi estas amiko de la reĝo Tie mi havas la virinon, kiun mi volas En la lito elektita de mi Ĉi tie mi ne estas feliĉa, sed en Pasargado, same kiel en Spegulujo, estas eble aventurumi kaj feliĉumi senfine En Pasargado estas belaj kaj puraj putinoj, kiujn ni povas libere amindumi Mi forveturos al Pasargado **Fina punkto!**

Certe la foto-rakonto kiun ni publikigas ĉi-apude ne estas juvelo. Kiel klarigis Sylla Chaves en la antikva versio, temas pri banala temo sed tiutempe – en la 1960-aj jaroj – ĝia publikigo grave rolis en la kultura agado de la brazilaj esperantistoj. Nia intenco reaperigi ĝin iom modifita, utiligante nur kelkajn el la 42 originalaj fotoj, havas unu grandan celon: anonci, ke Spegulo estas malfermita al ĉiuspecaj eksperimentoj. Bonvenon al la novaj talentoj... kaj al la malnovaj kiuj ne timas paŝi tra novaj padoj.

Spegulo estas revo. Spegulo estas novumo. Spegulo estas ni mem antaŭ nia kapablo rezigni aŭ rezisti. Krei aŭ malkrei. Ludi aŭ malludi. Spegulo planas fariĝi avangardo de arto kaj kulturo en Esperantujo, sed marteladas en nia kapo obstina demando: Ĉu Esperantujo bezonas avangardan voĉon sur la kampo de arto kaj kulturo?

\* Titolo de brazila poemo, kiu iam aperis en Spegulo. Kelkajn el ĝiaj versoj ni plukis kaj modifis.

1



Mateniĝas. La suno komencas etendiĝi super la vojoj kaj placoj de granda metropolo. La urbo ankoraŭ vekiga... le, en ĝi, paŝadas mezaĝa viro, ordinara homo, kiel multaj aliaj, neatentanta pri la ĉirkaŭaĵo, kaj ankaŭ neatentata.

2




Li cerbumas pri tio, kio atendas lin en proksima duetaĝa domo. Puŝita de angoro, li mekanike iras antaŭen.

3


La kuracisto sidas ĉe malmoderna tablo. Li konsultas libron kaj skribas sur bloko de receptoj.

4




En la unuaj ŝtupoj, dubo aldoniĝas al la sentoj, kiuj jam turmentas lin. La viro alvenas ĉe la pordo de kuracista konsultejo. Sendecide, li hezitas ĉu li parolu la kuraciston aŭ ne.

5




Post pluraj ekprovoj, la homo parolas: — Mi venis por vin konsulti, doktoro!

6



La kuracisto eklasas la laboron, kaj kun kapmovado, alrigardas malgajan homon el super siaj okulvitroj.

7



La homo daŭrigas: — La malbono, kiun mi havas kaj min martirigas, ŝtelante miajn prudenton kaj junecon, estas kancero, kiu neniam cikatriĝas. Mi havas koron, kiu ne pulsas. Kapon, kiu ne pensas, nek fantazias! Nigra enuo venenas miajn tagojn... enuo, kiu murdas la kisojn disvendatajn en orgioj de senfina nokto diboĉa! Vi, kiu estas filozofa profunda, la plej saĝa kuracisto de l' mondo; vi, kiu konas la spiriton kaj la korpon... mi kredas, ke vi kuracos la kruelan malsanon, kiu detruas mian cerbon kaj min frakasas!



# latti | Originale eldonita de KKE/BEL

8

La kuracisto pacience aŭdas la senesperajn plendojn de la malgaja homo. Poste li detale ekzamenas la bedaŭrindulon...

9



— Vi pravas! Vi malsanas! Tiu stranga malsano, kiu vin formanĝas, estas tre ordinara lastatempe. Kelkfoje, iu emocio, iu tre granda korsento, valoras multe kaj faras, en momento, miraklon de kuraco. Enuo estas malsano de l' animo. Ĝi estas fatala frenezo, la nigra nokto sendifina de la homa koro. Ĝi faras, ke ni forgesu nian propran memon, nian propran sorton, ke ni fariĝu blindaj pri la vivo kaj antaŭvidu la morton.

11



— Iru al Oriento, sinjoro! Al Grekio. Al la Sankta Lando, kie ĉio floras... ĉio kantas!

10

— Ĝi similas la ondon, kiu sin agitas kaj kreskas en la fora maro kun kriado, kiu surdigas la aeron. Ĝi haltas, sed tuj revenas!

12



La homo, kiu senespere aŭdis, respondas al la kuracisto ankoraŭ pli triste:  
— Mi ja vojaĝis, doktoro! Mi vojaĝegis! Simile al sendestina judo de l' legendo kaj el la sennombraj virinoj, kiujn miaj lipoj kisis, en delira momento de frenezo infera neniu el ili ĉesis esti fremda.

13



— Mi revenis sama, kia mi estis foririnta. Doktoro, tiu ĉi malsano estas senkuraca. Ĉio estas kuracebla, doktoro. Nur la enuo, ne.

14



Priokupita pri la kliento, la kuracisto klopodas trovi iun ajn solvon:  
— Ne! Ne diru tion, mia filo! Atendu nur!

15

— Jes, prave!  
Iru al la cirko, sinjoro. Iru al la cirko, ĉar eble la pajaco, per siaj amuzaĵoj, kiujn senlace aplaŭdas la amasojn... Kaj la kuracisto al la eldiro aldonas laŭtan ridegon, klopodante gajigi la klienton:  
— Eble tiuj amuzaĵoj finfine vekos vin, kaj igos vin ridegi! Ha...ha...ha.

16



Kaj la kliento komencas plori:  
— Mi ja vidas, doktoro, ke tiu ĉi malsano estas fakte nekuracebla. La pajaco, kiu igas la amasojn ridi, ĉiuvespere en la Kolizeo... havas ridegon stultan, plenan je mizero! Tiu ridego venas el infero! Tiu pajaco... tiu pajaco, doktoro...

17



— ... tiu pajaco esta mi!

# Fabrício Valle tra Eŭropo por *Heroldo* kaj Sociala Lingvo

Fabrício Valle, brazila esperantisto kaj redakcia direktoro de *Heroldo*, planas labor-ekskursi tra parto de Eŭropo inter la 8-a de junio kaj la 28-a de aŭgusto, sed nur per kunlaborado de lokaj grupoj el la principe celataj landoj\*. Li povos tiel konkretigi sian mision por *Heroldo de Esperanto* kaj por la internacia neregistara organizo Sociala Lingvo.



## CELO DE LA VOJAĜO

Diskonigi diversajn aspektojn pri la funkciado de la nova *Heroldo de Esperanto* kaj diskuti ĝian estonton; prezenti la internacian neregistaran organizaĵon Sociala Lingvo, kiu estos fondita inter marto kaj majo 2018 en Brazilo.

## STRATEGIO

Italio estos lia bazo kaj de tie li plenumos sian laboron en kvar etapoj laŭ regionoj, ĉiam revenante en Italion post la fino de ĉiu etapo. La partopreno en ĉiuj grandaj eventoj de tiu periodo, inkluzive de la UK kaj de la Itala Kongreso de Esperanto, estas grava parto de la strategio.

## KUNLABORO NECESA

Estos necesa sufiĉe frua enplektiĝo de lokaj grupoj por organizi kunsidojn. Fabrício Valle proponas plurajn elekteblajn prelegojn. Helpo por la gastado kaj eventuala eta financa kompenso pro la prelegoj estos bonvenaj.

## PAGAJ KURSOJ

En urboj kun pli bone strukturita loka movado eblos organizi 12-horan enkondukan kurson de Esperanto por komencantoj kontraŭ aliĝkotiĝo. La diskonigado de la kurso okazos per interreto, per speciala retpaĝo en la loka lingvo kaj per lokaj rimedoj. Parto de la enspezo apartenos al la loka organizanto.

## ITINERO

La itinero devas esti zorge kaj detale planata. Pro tio gravas tre fruaj kontaktoj inter Fabrício Valle kaj la potencialaj kunlaborantoj.

## AGU

Agu tuj kaj diskutu en via grupo la proponon de Fabrício Valle. Li ŝategos koni vian grupon kaj interŝanĝi ideojn, prelegi, amikumi kaj Heroldumi. Lia retadreso estas [redakciadirektoro@heroldodeesperanto.com](mailto:redakciadirektoro@heroldodeesperanto.com)

\* Italio, Svislando, Francio, Britio, Germanio, Hispanio (kaj Katalunio klopodanta sendependiĝi), Portugalio, Nederlando, Belgio, Aŭstrio, Pollando, Hungario, Ĉeĥio kaj Slovakio



# Scienca Heroldo

## Ĉu la Tero fariĝos neloĝebla fajrobulo ĝis la jaro 2600?

Amri Wandel

La homa ekspluatado transformos nian planedon en neloĝeblan fajroglobon antaŭ la jaro 2600, diris la fizikisto Stephen Hawking en la "Tencent WE", pinto-kunveno okazinta en Pekino komence de novembro 2017 (<https://www.youtube.com/watch?v=lzoyxOt4-EA>). Ne ĉiuj sciencistoj samopinias: iuj asertas ke la homa poluado ne rilatas al la planeda varmiĝo. Sekve Hawking konsilas ke, por pluekzisti, la homaro devas transloĝiĝi al planedoj de aliaj sunsistemoj, kiuj eble estos atingeblaj per estonta speco de nano-spacŝipo ende de kelkaj jardekoj.

### SCIENCISTOJ AVERTAS

Pro troaj denseco kaj energikonsumo la Tero fariĝos neloĝebla post malmultaj jarcentoj, konstatis Hawking. Li ne estas la sola avertanto. Pli ol 15.000 sciencistoj el 184 lan-

doj subskribis la 13-an de novembro 2017, artikolon titolitan *Averto al la Homaro de Mondaj Sciencistoj*. En ĝi, ili detale pravas ekologiajn zorgojn kaj listigas proponojn por pli bona vojo antaŭen. La profunda negativa efiko de homa aktiveco en nia medio estas pridiskutita.

Tiu kampanjo sekvas la paŝojn de *Averto al Homaro de Sciencistoj*, artikolo eldonita de la Unio de Koncernataj Sciencistoj en 1992. Tiam 1.700 fakuloj subskribis dokumenton, kiu devus pruvi kiom maltrankviliga estas la situacio. La nuna kampanjo estas revizio de la tiama averto, publikigita antaŭ 25 jaroj, kaj takso ĉu okazis progreso.

### PUNKTO DE NE-REVENO?

Laŭ la plej nova artikolo de *Averto al la Homaro*, la situacio estas tre malbona, kaj la aŭtoroj provizas donitaĵojn kaj statistikojn, kiuj ilustras kiom da damaĝo jam okazis

dum la lastaj 25 jaroj.

Simile Hawking esprimis sin en julio 2017, reage al la decido de Donald Trump forlasi la akordon de Parizo pri redukto de la emisio de karbon-dioksido.

"Ni estas proksimaj al la punkto, kie tutmonda varmiĝo fariĝos neinvertigebla," diris Hawking al BBC. La konsekvencoj, li klarigis, estus gravaj por nia planedo. "Ili povus transpuŝi la Teron preter la limon de katastrofavarmiĝo, ĝi povus fariĝi kiel Venuso, kun temperaturo de kelkcentoj da gradoj."

Kvankam tiu deklaro de Hawking ŝajnas troiga, la efiko de tutmonda varmiĝo kaj klimata ŝanĝiĝo estas realaj kaj ne devus esti ignorataj. "Neante la evidentecon pri klimata ŝanĝo, kaj eltirante sin el la Pariza Klimata Interkonsento, Donald Trump kaŭzos evitendan median damaĝon al nia bela planedo, endanĝerigante la naturan mondon, por ni kaj niaj infanoj," aldonis Hawking.

### ĈU LA AVERTOJ ESTAS TROIGAJ?

Ne ĉiuj sciencistoj samopinias kun Hawking kaj la plimulto de la avertantoj, ke la homa akcelita ekspluatado kaj uzado de fosiliaj energifontoj estas la kaŭzo de la tutmonda varmiĝo. Kvankam ĉiuj konsentas ke la emisio de karbon-dioksido pro industrio kaj aŭtoj ja plialtigis ĝian kvanton en la atmosfero, esploro pri la historio de la atmosfero montras ke estis epokoj kiam la abundeco de karbon-dioksido estis notinde pli alta ol nuntempe, sed la temperaturo ne. Eĉ lastatempe, en la 1960-aj kaj 1970-aj jaroj la averaĝa temperaturo malkreskis, dum la tiel nomata "eta glaciepoko". En intervjuo ĉe la israela televido (<https://www.youtube.com/watch?v=zRjhhkqAWc> min. 1:35) meze de novembro 2017, mi diskutis la asertojn de Hawking kaj ankaŭ prezentis kaj motivigis la kontraŭan opinion; aldone mi esprimis mian vidpunkton pri la propono de Ha-

wking serĉi novan hejmon sur alia planedo.

### ĈU LA HOMARO DEVOS SERĈI NOVAN HEJMON?

Por eviti ĉi tiun sorton, Hawking diris, la homa speco devos serĉi loĝeblan planedon aliloke. Sed per la nuntempaj teknikaj rimedoj fari tion ne estas eble – eĉ vojaĝo al la plej proksima sistemo daŭrus dekmiloj da jaroj. Hawking partoprenas la iniciaton *Breakthrough Starshot*, kiu planas evoluigi nano-kosmoŝipojn, akceligitajn per potenca lasero al rapideco milobla de tiu de la hodiaŭaj kosmoŝipoj. Ili povos atingi la plej proksiman stelsistemon, Alpha Centauri, ene de 20 jaroj, por esplori ĉu estas tie loĝebla planedo. Ankaŭ la direktoro de la spac-enterpreno *SpaceX*, Elon Musk, simile sugestis, ke por supervivi amas-pereigan eventon la homaro devus disvastiĝi en la spacon kaj fariĝi "mult-planeda specio."

## Progreso koncerne la kuracon de Spina Muskola Atrofio (SMA)

Christoph Klawe

SMA estas grava genetica malsano, kiu kaŭzas degeneron de la muskoloj kaj gravan handikapon. Efika kuracmetodo ĝis nun ne ekzistas. Estas diversaj formoj, SMA1-4. Trafitoj de la plej grava formo, SMA1, mortas kutime ene de la du unuaj viv-

jaroj. En la numero de *New England Journal of Medicine* aperinta en la 2-a de novembro 2017 estas priraportitaj du novaj kuracmetodoj, kiuj donas iom da espero al la pacientoj kaj iliaj familioj. En unu el ili, helpe de manipulita adenoviruso, oni sukcesis per infuzado porti la sanan genon en la ĉelojn, kie ĝi mankis. Ĉiuj gemalsanu-


loj bone toleris la metodon sen gravaj kromefikoj. El la 15 pacientoj ĉiuj estis vivaj post 20 monatoj, kompare al nur 8% en antaŭe science observitaj grupoj. Temas pri tre grava paŝo antaŭen, sed pliaj esploroj estos bezonataj por vere esti certaj pri la taŭgeco de la metodo (*N Engl J Med* 2017;377:1713-22). Kadre de alia freŝe publikigita ku-

rasesploro, oni injektis en la sacon inter la spina medolo kaj ties kovraĵo, kiu estis plenigita per likvaĵo, fragmenton de artefarita pra-mRNA (do genetikana informon), kiu poste igas, ke la difektita geno produktu tamen pli da normala proteino. La uzita "antisenca"\* oligonukleotido ricevis la nomon *Nusinersen*. La pacientoj,

kiuj ricevis *Nusinersen*-on, pli probable travivis kaj havis eĉ plibonigon de la moviĝkapablo kompare al kontrolgrupo. Verŝajne tre frua apliko de la metodo necesas por pligrandigi la bonan efikon de la kuracilo (*N Engl J Med* 2017;377:1723-32).

\* En la angla: "antisense": kontraŭ la kutima direkto de "legado" de la genetica kodo.

**Edi studio**  
www.edistudio.it



**Piero Nissim kaj Franco Meoli**  
**La kantado de la komenco**  
KD de originalaj kantoj  
15,00 €







# Nova NRO venos en la mondon por agado per Esperanto

Inter marto kaj majo 2018 Esperantujo estos naskiĝejo de nova internacia neregistara organizaĵo, kiu adoptos Esperanton kiel laborlingvon por sia agado en internacia skalo.

Se interesas vin agado per Esperanto sur unu el la plej diversaj kampoj de la tria sektoro (NRO-j), Sociala Lingvo sin prezentos kiel ŝlosilan mondan organizaĵon uzantan Esperanton por tre konkrete roli en la evoluigo de la praktika uzo de Esperanto. Vi povos agadi ĝuste en via preferata laborkampo!



## CELARO



Roli kiel inkubatoro (kovejo) de ĉefmotoraj kaj lokmotoraj NRO-j ĉie tra la mondo. Tiuj NRO-j laboros harmonie en horizontala nivelo



Organizi internacian reton de komunumaj lingvo-lernejoj, kie Esperanto rolos kiel propedeŭtika lingvo



Organizi kaj funkciigi reton de ĉiuj ĉefmotoraj kaj lokmotoraj NRO-j, en sistemo bazita sur internacia interorganiza mutualismo

## KIAJN MEMBROJN NI SERĈAS EKDE NUN?

Sociala Lingvo jam havas bazan grupon laborantan por ĝia fondo en Brazilo (sidejo de la nova NRO Sociala Lingvo), sed nun venas la horo internaciigi ĝian fondo-grupon, per enplekto de Esperantaj socialaj aktivuloj el la tuta mondo. Tiajn homojn ni serĉas:

- pretajn aktivi sur sia preferata kampo: lingvo-instruado, edukado, kulturo, scienco, solidara ekonomio, homaj rajtoj, arto, homa solidareco, sociala asistado ktp;
- pretajn agadi konkrete ĉu kadre de Sociala Lingvo, ĉu kiel kunkreantoj de ĉefmotora aŭ lokmotora NRO en sia urbo.

### Atentu

Oni ne devos pagi aliĝkoton por fariĝi membro de Sociala Lingvo, nek jare, nek monate, sed aliflanke ne interesas nin pasivaj membroj. Sociala Lingvo estos NRO de aktive agantaj membroj. Malmultaj ni estos, sed ni volas konkrete fari multon. Simpatiantoj povos poste fariĝi subtenantoj.

Kontaktu nin tuj kaj prezentu viajn demandojn/dubojn. Eksciu kiel vi povos partopreni ĉi tiun grupon kiu volas kunlabori pri la ŝanĝo de la mondo per Esperanto.

<http://bit.ly/partopreno-socialalingvo>

**Sociala Lingvo** Per Esperanto ŝanĝi la mondon

# Edistudio

www.edistudio.it



## 1977-2017: de 40 jaroj eldonas en Esperanto

### En 2020 *Heroldo de Esperanto* 100-jariĝos

Ni planas organizi grandiozan jubilean festadon, ĉar ne ĉiutage gazeto 100-jariĝas kaj, okaze de HdE, ĝi sendube meritas festegon pro sia granda kontribuo al la E-movado ekde 1920.

Por ke ĝi vivu aliajn 100 jarojn... kaj ekde nun ankaŭ kun nacilingvaj eldonoj por neesperantistoj, nepre anticipu vian kontribuon por la jubileo. Elektu tuj vian donacon inter la ĉi-subaj opcioj.



- Abono por la papera versio + reta versio
- Abono por nur la reta versio
- Solidara abono por nepagpovuloj

Abonu tuj ĉe - [www.heroldodeesperanto.com](http://www.heroldodeesperanto.com)

**PAGMANIEROJ** Vi povos pagi vian abonon per  
 ● PayPal ● UEA-konto ● Banka Ĝiro (nur brazilanoj)

**INFORMPETOJ:** Google-grupo por demandoj pri ĉiuj aspektoj de *Heroldo*  
 ● <http://bit.ly/HeroldoRespondas> ● [informpeto@heroldodeesperanto.com](mailto:informpeto@heroldodeesperanto.com)

**HDE-JUBILEO: 100-JARIĜO** Aliĝu al la festontoj de la Jubileo de *Heroldo de Esperanto*  
 Informiĝu pri la historio de *Heroldo*, legu malnovajn artikolojn el la tempo de la tri antaŭaj fazoj kaj la opinion de la veteranaj kaj novbakitaj legantoj de *Heroldo*  
<http://bit.ly/HdE-Jubileo>